

Por « La SAGO », organo de SATamikaro

Temo :

Kiu fremda lingvo estas la plej malfacila por lerni ?

Romanda (franclingva svisa) infano lernas en la lernejo unue la germanan. Lernantoj en multaj eŭropaj landoj lernas en la lernejo unue la anglan. Eble iu lernanto lernas unue la ĉinan.

Kiu fremda lingvo estas la plej malfacila por lerni ?

Kelkaj homoj diras, ke tio dependas de la lernota lingvo, aŭ ankaŭ de la gepatra lingvo, de la gepatraj lingvoj. Ĉu japano lernanta la ĉinan same ŝvitos aŭ malpli ŝvitos ol koreo lernanta la ĉinan ?? Ĉu ruso lernanta la germanan same ŝvitos aŭ malpli ŝvitos ol hispano ?

Malsamaj situacioj abundas.

Tamen la respondo estas facila kaj ĉiam la sama : la plej malfacila fremda lingvo estas la unua lernota lingvo (krom se temas pri esperanto, kompreneble. Vidu suben).

Kiam infano akiras komunikkapablon, lingvokapablon, uzante sia(j)n gepatra(j)n lingvo(j)n, li aŭ ŝi akiras kapablon ricevi manĝaĵojn, trinkaĵojn, ekkontakti la gepatrojn, ricevi deziratajn objektojn, ekkoni la mondon, nomi la ĉiutagajn objektojn. Neniam iu homo akiras alian lingvon en tiu situacio, en kiu lia aŭ ŝia pluvivado dependas de la sukceso de tiu komunikado (laŭ lingvisto François Grosjean, kiu ne estas parenco mia). Tio signifas, ke se iu lingvoinstituto promesas al vi akiron de lingvo laŭ la sama vojo kiel denaskulo, ĝi mensogas.

En la momento, kiam infano aŭ plenkreskulo lernas fremdan lingvon, li aŭ ŝi devas distanciĝi de sia denaska lingvo. Tie kuŝas la problemo. Tie farendas malfacila paŝo. Jam la persono akiris la vortojn « tablo », « taso », « forko » ... kaj devas forlasi ilin kaj pensi kaj diri por tiuj objektoj alian vorton. Tio signifas rezigno, forlaso. Psikologie tiu paŝo estas malagraba. Ofte oni povas konstati, ke la persono forte ŝatas, amas, siajn vortojn kaj senkonscie bremsas ilian. Same kiel infano forte tenanta sian plej ŝatatan ludilon, kiam ĝi devas iri al malsanulejo por kelkaj tagoj. Lingvon oni ricevas samtempe kiel la rideto kaj voĉo de la gepatroj en lulilo. Pro tio ekzistas tiu forta ligo.

Tiu tikla fazo de « distanciĝo » estas malfacila, sed necesa. La instruisto devas koni ĝin kaj « akompani » la lernantojn parolante pri tiu paŝo,

analizante ĝin, klarigante ĝin, kiel oni preparas infanon al enhospitala restado.

Se la lernanto unue akiras konojn en esperanto, li aŭ ŝi malkovros mirindan kaj regulan sistemon kaj ĝuos la lernadon. Tute alia situacio, feliĉiga kaj amuza.

Mireille Grosjean